# SUDFRANCA STELO

Bülteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban* - 66-**PERPIGNAN** (P.-O.) - *Telefono 34-38-84*

Jara Abono : 3 F. – C. C. P. 956-28 Montpellier

N° 34 ------------ Jara Abono : 3 F. ---------- 1a Trimonato 1970 ----

## FEDERATION DEPARTEMENTALE DU GARD POUR L'ESPERANTO

Pro apartaj konsideroj, ni prokrastis la aranĝon de la ĝenerala asembleo.

Ĝi okazos en Alès : Centre Culturel Communal, 2 Pl. Henri Barbusse. La dimanĉon 15 an de Februaro, je la 10a.

En la tagordo, post la kutimaj raportoj estas antaŭvidita la renovigo de 1/3 de la estraro kaj la utiligo de la subvencio kiun ni ricevis de la ĝenerala konsilantaro.

Ni esperas, ke ĉiuj esperantistoj de Gard faros sian eblon por ĉeesti.

Ni rememorigas, ke la jar-kotizo, inkluzive la abonon al Sud Franca Stelo, estas fiksita je 5 F. kiujn oni povas pagi al Federation Départementale du Gard pour Esperanto.

C.C.P. MONTPELLIER 185-707.

+++++++

## F-ino Kimie OZAWA ĉarmigis la francajn katalunojn.

De la 2-a ĝis la 7-a de januaro 1970, La Kultura Esperanto Centro de Perpignan ( Pyrénées-Orientales) akceptis F-inon Kimie OZAWA, juna japanino el Tokio, kiu uzas esperanton por prezenti en Eùropo, revolucian kalkulaparaton por blinduloj " Soroban".

Krom du privataj demonstracioj kiujn ŝi faris ĉe la blindaj societoj de Perpignan, sub la aùspicioj de la Kultura Esperanto-Centro, F-ino OZAWA partoprenis publikan prelegon, organizitan de la Politeknika Asocio de Perpignan, kies ĉefa rolanto estis S-ro René BENAZET, alia samideano, kiu prelegis pri Finlando, Laponio kaj la U.K. de Helsinki.

Televido, Radio kaj gazetoj favore raportis pri la manifestacioj ĉu ĉe la blindaj societoj, ĉu ĉe la Politeknika Asocio.

Ni ĝojas pri la restado en Perpignan de F-ino OZAWA ĉar dank' al ŝia rideto kaj ŝia scipovo de nia lingvo ( S-ro René LLECH-WALTER Honora Prezidento de U.F.E. tradukis Franclingven ĉiujn klarigojn) la publiko komprenis, ke esperanto ne estas stultaĵo. La rezulto estas ke du novajn kursojn oni malfermis la 15-an de januaro en nia urbo.

Korajn dankojn al nia japana samideanino.

R. LLECH-WALTER

## VIVO DE LA GRUPOJ.

### ALES

Ekde la komenco de la jaro, nia kurso funkcias ĉiumarde ĉe la komunuma Kultura Centro.

La 13 an kaj 14 an de Januaro, en kunlaboro kun " L'Amitié des Aveugles de France ", ni akceptis fraŭlinon Kimie OZAWA.
Malgraŭ kelkaj lasthoraj malfacilaĵoj por trovi preleg-ĉambron ni povis aranĝi prezentadon de la japana kalkulilo en klas-ĉambro de la teknika liceo . Ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis el kiuj duono estis gejunuloj. Tio ebligis al ni ĵeti esperantistan semon kaj havigis al nia kurso 3 novajn geaŭskultantojn.

++++
++

### BEZIERS

La grupo kunvenas regule. De oktobro 2 kursoj okazas : perfektiga kurso kaj kurso por komencantoj.

Dum aŭgusto, 4 gegrupanoj partoprenis la " kulturajn semajnojn" en Gresillon. Agrabla restado, promenoj....kaj profita laboro.

Nun la grupo multe zorgas pri la organizado de la SAT Amikara kongreso en Beziers de la 28a ĝis la 31a de marto. Ĝi okazos en la Kongres-Palaco sub la honor-prezidanteco de Jean ROSTAND. Krom la laborkunsidoj okazos 2 ekskursoj ( Sete, Bouzigues kaj Pezenas, Navacelle, Mourèze ) kaj 3 distraj vesperoj.

Se tio interesas vin petu informojn kaj aliĝilojn de Groupe Esperantist Biterrois
59 Place des Bons Amis.
34 BEZIERS.

+++
+

### MONTPELLIER

Groupe Esperantiste de Montpellier
C.C.P. 1487-48 Montpellier.
Sidejo : 5 Rue Docteur ROUX
Kunvenejo : Foyer d'Accueil du Mas de Tesse
1575 rue de las sorbes.
Kunveno : ĉiun unuan lundon de la monato je 20h 45.

Du gravaj eventoj dum tiu lasta trimonato :
Unue la ŝanĝo de nia kunvenejo. De januaro ni havas novan kunvenejon en moderna kaj konforta domo, kun brakseĝoj ...venu multaj por admiri ĝin.

Gia adreso : Foyer d'Accueil du Mas de Tesse, 1575 rue de las sorbes, malantaŭ la liceo Mas de Tesse.

Due : la Akcepto de Kimie OZAWA. Ŝi restis 10 tagojn ĉe ni, de kie ŝi iris al Nimes, Perpignan, Barcelono, St Chinian. Multaj Montpel lieranoj babilis kun nia afabla amikino, ĉu hejme, ĉu dum nia kunveno. Dank'al ŝi, du tre lertaj artikoloj aperis pri esperanto,kaj Japanio. Do bona propagando.

Dankon, Kimie OZAWA.

NIMES

## Raporto pri la agado en Nimes.

Ni estas feliĉaj sciigi ke la Prezidanto kaj la komitato de la Turisma oficejo ŝajnas nun favoraj al nia agado. Ili permesis al la du oficistinoj lerni esperanton dum sia deĵorado kaj fakte la kurseto jam komenciĝis.

Plie la prezidanto petis de mi tradukon en esperanto de resuma paĝo el la gvidilo por Gardo. Jam ekzistas dua eldonaĵo de la fald prospekto pri la urbo Nimes kun nigraj bildoj.

Vizitoj de Kimie OZAWA

Ni akceptis ŝin dufoje. Fine de decembro; la momento estis malfavora : kelkaj personoj libertempis, multaj estis malsanaj pro gripo kaj fine pluvegis la 30an kiam la grupanoj kunvenis ĉirkaŭ ŝi. Tamen ni povis konduki ŝin ( sub pluvo sed aùtomobile...) al Vergèze, kie ŝi renkontis S-ron Cesarano kaj ŝian lernantinon kaj allogis kelkajn gejunulojn montrante kaj klarigante sian globetkalkulilon. Sed ĉe nia kunveno, malmulte da ĉeestantoj.

Je la dua mallonga restado de K.O. en Nimes ,bonŝanco bonvolis rideti al ni. Multaj esperantistoj el Nimes, inter kiuj tri gejunuloj kaj samideano el Arles, kaj tri ne esperantistoj kunvenis por aùskulti Kimie; ili estis ege interesitaj kaj la agrabla vespero pasis tro rapide. Unu ĉeestanto decidis lerni esperanton.

Ne perdante eĉ unu minuton, ni akompanis nian amikinon al du gazetejoj : Midi-Libre kaj Meridional, kaj de la Marseillaise venis al ni ĵurnalisto. De la 15an de Januaro ĉiuj regionaj gazetoj enhavis longan artikolon kaj foton, kaj la Nimanoj ŝajnas informitaj pri nia afero. Plie Meridional sendis al ni hieraù gazetiston por nova artikolo pri la Cercle Culturel Esp. de Nimes.

Entute tre efika propagando dank'al Kimie OZAWA.

+‡+

KUNVENO EN NARBONNE.

La 25an de januaro en Narbonne okazis komitata kunveno de la Federacio Languedoc-Roussillon. Dek laboremuloj pristudis la proble mojn de la esperanta movado en la regiono.

Resume : Bona laboro, agrabla etoso.

+++
+

FEDERACIO HERAULT.

La departementa konsilantaro ne forgesis nin, kaj redonis al ni subvencion; do vi ne forgesu pagi vian kotizon. 4 frankoj kiuj enkalkulas la abonon al Sud Franca Stelo. La grupanoj (Beziers-Montpellier) pagu al sia grupo; la izolulоj rekte al la Federation Departementale Esperanto C.C.P. 1689-89 Montpellier.